

# FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE  
77610 FONTENAY TRÉSIGNY  
FRANCE

# KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★  
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

|  |                                   |                 |
|--|-----------------------------------|-----------------|
| Prezidanta: S-ro A. BESSIERE                             | 28, rue C. Saint-Saëns            | 76000 ROUEN     |
| Sekr: F-ino G. PREUX                                     | 55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 nov. | 59290 WASQUEHAL |
| Kasistino: S-ino J. VINCENT                              | 26 bis, rue Milngavie             | 49150 BAUGE     |
| Religia konsilanta: P-ro L. BOURDON                      | 7, av. Salomon                    | 59000 LILLE     |
| Peranto I.K.U.E.: P-ro R. DEGRELLE                       | 12, r. Estienne d'Orves           | 54490 PIENNES   |
| C.C.P: Association Catholique Française pour l'Espéranto | 2324 93 N                         | ROUEN           |

==== la n°: 6 F. Abona: 23 F (TTC). Katizo: 7 F. Sumo: 30 F. ====

+++++

==== N.º 163 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====  
\*\*\* Sankta PIO X-a, preĝu por ni. \*\*\*

==== DECEMBRO 1989 ====

+++++

## LE MOT DU PRESIDENT

Bientôt, après la joie de Noël, nous entrerons dans une nouvelle année. Que celle-ci vous apporte santé et bonheur et une foi renouvelée dans le Christ qui, chaque année, en cette période, se manifeste aux hommes de bonne volonté.

Plus que jamais, nous laisserons au monde matérialiste qui nous entoure les soucis purement profanes et nous nous tournerons vers le double idéal qui est le nôtre: celui de catholiques fidèles à la foi catholique et d'espérantistes désireux de répandre l'idéal de fraternité et de compréhension réciproque qui anime tous ceux qui pratiquent la Langue Internationale.

A. B.

## BILETO DE LA PREZIDANTO

Baldaŭ, post la kristnaska ĝojo, ni eniros novan jaron. Tiu ĉi alportu al vi sanon kaj feliĉon kaj renovigitan fidon en Kristo, kiu, ĉiujare, en tiu periodo, manifestiĝas al la bonvolaj homoj.

Pli ol iam ajn, ni lasos al la materialista mondo, kiu nin ĉirkaŭas, la pure profanajn zorgojn kaj ni nin turnos al la duobla idealo, kiu estas nia: tiu de katolikoj fidelaj al la katolika kredo, kaj de esperantistoj dezirantaj disvastigi la idealon pri frateco kaj reciproka kompreno, kiu vivas en ĉiuj praktikantoj de la Lingvo Internacia.

+++++

## PREĜO AL LA TRI REĜOJ

Via koro ekiris al Dio en la sama momento, kiam viaj piedoj iris al Betlehemo. Vi estis serĉantaj Dion kaj Dio gvidis vian serĉadon tuj post kiam vi rekomencis ĝin.

Kiam vi alvenas ĉe la Infano, vi genuiĝas... Vi ofertas la oron de via amo, la incenson de via respekto, la mirhon de viaj suferoj al la nevidebla Dio, kiu vidas viaj okuloj.

Sed, kiam per sekvi sian stelon, oni donacis sian koron kaj la sangon de sia koro, oni sukcese plenumis sian vivhistorion? Ha ĝoju ni! La koroj batantaj en tiuj vojaĝantaj homoj estas vere reĝaj.

..//...

Kaj vi, aŭdacu same la vojaĝon al Dio. Ek! Ekiru! Forgesu la estintecon; ĝi mortis. Kio sola restas, tio estas la estonteco. Rigardu do antaŭen: la vivo kaj ĝiaj tutaj eblecoj ĉeestas, ĉar oni ĉiam povas trovi Dion, ĉiam trovi Lin pli. Laŭ Karl Rahner.

XX

KRISTNASKO

Stratoj, placo - forlasitaj;  
el la domoj - milda lum'.  
Mi trairas kun medito;  
Ĉio nun en fest-kostum'!

La fenestrojn pie garnis  
la patrinoj per ludil'.  
En feliĉ' senbrua, mire  
gapas infanetoj mil.

Joseph von Eichendorff  
(1788-1857)

Kaj mi vagas el la muroj  
ĝis libera horizont'.  
Bril' sublimes, sankta tremo!  
Vastas la silenta mondo'.

Alte, steloj faras rondojn.  
El soleca neĝa fon'  
sorĉe ŝvebas kvazaŭ kanto.  
Ha, gracplena vi sezono'!

El la germana tradukis  
A. Burkhardt

XX

EL LA TAGLIBRO DE BLACK HORSE

Mi nomiĝas Black Horse (Nigra Ĉevalo) kaj vivas sur la verdaj kampoj de la angla Sussex, apud la kongresejo Annan Court.

La sabaton 22-an de julio 1989 okazis io eksterordinara. Preskaŭ cent homoj alvenis; ili ne parolis la anglan lingvon sed alian, kiun ili nomas inter-nacia; bela, harmonia, ĝi tuj plaĉis al mi.

La sekvantan tagon, ili kunvenis en dometo apud mia kampo. Nerimarkite mi alproksimiĝis, streĉis miajn longajn orelojn kaj malfermis miajn okulojn. Tiu homoj, kvankam el diversaj kredkonfesoj, kune kaj frate laŭdis la Sinjoron, kanta ante belegajn religiajn kantojn, kiujn mi tre ŝatis.

Dum la tuta semajno, ili multe laboris, ĉu kune, ĉu en studrondoj, pri grava temo: "Justeco, paco kaj konservado de la kreitaĵo". Kvankam ili tute ne atentis pri mi, mi bone aŭskultis ilin kaj plezure konstatis, ke ili emfazis la neceson esti tolerema, bonkora, helpema al ĉiuj, kredantoj kaj nekredantoj kaj respekti la kreitaĵon. Tiu punkto precipe tre plaĉis al mi. La ĉevaloj bone scias, ke mi devas uzi la kreitaĵon sed ne eluzi ĝin, kiel bedaŭrinde ofte faras tro da homoj. La kongresanoj ankaŭ multe babilis, muzikis, kantis en tre frata etoso. Kelkaj eĉ promenadis sur la kamparo kaj alparolis min en sia harmonia lingvo, karante mian kapon, kion mi tre ŝatis. Vere tiaj kristanoj esperantistoj, kiel ili nomas sin, estas simpatiaj homoj.

Black Horse.

XX

RONDELO OMAGE AL JOHANA MICHAU

Fidela, kara Johanino,  
En F.K.E.A.komitat'  
Senmanke en la debat'  
Vi partoprenis sen rutin'.

Eterne en la dia sino  
Pro Virgulino, advokat',  
Fidela, kara Johanino,  
En F.K.E.A. komitat'.

Vi esperantis kun obstino  
Tuj servopreta kandidat'  
Restinte for de ĉiu flat'  
Vi niakoros ja sen fin'

Fidela, kara Johanino.

Roger Degrelle 5/9/1989

XX

Novaj membroj 1989: 2) S-ro BARON (I & L); 3) S-ro BINCHE (I & L). Bonvenon!











ENHAVO

- |                                   |                                   |
|-----------------------------------|-----------------------------------|
| 1. Le mot du président            | Diraĵoj el Chiara Lubich          |
| Preĝo al la tri Reĝoj             | 4. Protokolo de la komitatkunveno |
| 2. Kristnasko                     | Informado en pilgrimejo           |
| El la taglibro de Black Horse     | Administra angulo                 |
| Rondelo omaĝe al J. Michau        | 5. Substantiva epiteto            |
| 3. Kongreso en Bocca di Magra     | 6. Kiel fari florkarton           |
| Kolombo, simbolo de paco          | Kongreso en Bouresse              |
| 7. Praktikaj informoj kaj aliĝilo |                                   |

~~~~~

La Kristinfano alportu al vi kaj viaj familioj abundajn gracojn, kaj la Nova Jaro 1990 estu por la tuta mondo bona kaj feliĉiga.

~~~~~

KOTIZTABELO 1990

|  |           |
|--|-----------|
| I.K.U.E. kun "Espero Katolika"                         | 130 F     |
| Peranto: P-ro R. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.     |           |
| -----  |           |
| A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo | 40 F      |
| Geedza paro  | 50 F      |
| Infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o              | 20 F      |
| Bonfaranto   | 200 F     |
| Dumviva membro   | 800 F (1) |
| -----  |           |
| U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E° Actualités"       | 230 F     |
| U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro                    | 225 F     |

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

(1) Se vi pagos vian kotizon al A.C.F.E. antaŭ la 31-a de decembro, vi ankoraŭ ĝuos la tarifon por 1989. PAGU TUJ!

~~~~~

|                                  |                               |
|----------------------------------|-------------------------------|
| Dépôt légal: 4ème trimestre 1989 | !! Photocopié par l' A.C.F.E. |
| C.P.P.A.P. n° 62 532.            | !! Prieuré St-Martin          |
| Directeur: René-Claude Colas     | !! La Houssaye-en-Brie        |
| Directeur-délégué:               | !! 77610 FONTENAY TRESIGNY    |
| René-Jean Marmou                 | !! FRANCE                     |